# *Deklaro de la XX-a Pintkunveno de ALBA-TCP*

Image not found or type unknown

**Deklaro de ALBA-TCP**

Havano, dec 14 (RHK) La XXa Pintkunveno ALBA-TCP fini?is kun la adopto de politikaj interkonsentoj kaj agadplano, kiu subtenas ?ian sendependan kurson, por integri?o kaj kontra? la enmiksi?o de Usono.

Estis la konsento atingita en ?i tiu ?efurbo de la unuaj gvidantoj kaj reprezentantoj de la 10 nacioj, kiuj donas vivon al la Bolivara Alternativo por la Popoloj de Nia Ameriko-Komerca Interkonsento (ALBA-TCP).

ALBA-TCP estas la alternativo kontra? la nova ekonomia koloniismo, diras la fina deklaro sintezita de la kuba prezidento Miguel Díaz-Canel.

La deklaro malakceptis tion, kion ?i priskribis kiel "provojn de imperiismo konfuzi niajn popolojn" kaj kondamni ilin per unuflankaj trudaj rimedoj, emfazis la prezidento.

La Deklaro de Havano dankis Kubon pro ?ia kontribuo al aliaj popoloj kaj malakceptis la blokadon de Va?ingtono kontra? la plej granda el Antiloj kaj ?ian inkludon en unupartian liston de Usono sub terorismaj akuzoj.

Ni denuncas la mensogojn de imperiismo, kiu predikas pacon kaj praktikas militon, emfazas la teksto, kiu anka? simpatias kun Venezuelo, Nikaragvo kaj Bolivio.

Klimata ?an?o, elmigrado, la strategio post-Kovim-19, selektema protektismo estas inter la temoj pri kiuj la mekanismo proponas pluen anta?eniri.

?i anka? esprimas la ripetitan sindevontigon de Kubo kunlabori kun la membrolandoj de la bloko, precipe en la vakcinado kontra? la kronaviruso.

ALBA-TCP konsistas el 10 latin-amerikaj kaj karibaj landoj: Kubo, Venezuelo, Bolivio, Nikaragvo, Dominiko, Sankta Vincento kaj Grenadinoj, Antigvo kaj Barbudo, Sankt-Kito kaj Neviso, Sankta Lucio kaj Grenado.

La prezidentoj de Venezuelo, Nikaragvo kaj Bolivio, Nicolás Maduro, Daniel Ortega kaj Luis Arce, respektive, partoprenis en la konklavo. Anka? la ?efministro de Grenado, Keith Mitchell kaj de Sankta Vincento kaj Grenadinoj, Ralph Gonsalves.

Fonto: PL

...

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/279842-deklaro-de-la-xx-a-pintkunveno-de-alba-tcp

**Radio Habana Cuba**